

Usona *Esperantisto*

Dumonata bulteno • Bimonthly bulletin Vol 48, N° 5 (2009/5)



Jenja AMIS

Bonhumoraj Zamenhofanoj en Bjalistoko (pĝ. 8)

Ankaŭ ĉi-numere: Instruado: *Approaches to Classroom Instruction* • En la ĉielo: *Vojaĝu ekstergalaksie* • Beletre: *La kurioza rakonto de la ŝtuparo malaperanta* • Traduku: *Kio estas "it"?* • kaj pli...

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Vol 48, No 5 (2009/5)

Redaktisto • Editor: HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

✉ bulteno@esperanto-usa.org

Redaktofino por la venonta numero (2009/5):

Editorial deadline for the upcoming issue:

la 15-a de novembro, 2009

★★★

Usona Esperantisto estas la oficiala bulteno de Esperanto-USA. Kontribuoj estas bonvenaj en Esperanto aŭ la angla; prefere uzu retroŝton, se eble, kaj aldonu viajn plenan nomon, vizaĝofoton kaj (ret)poŝtadreson. Kun fotoj, nepre aldonu nomojn de fotinto kaj fotito(j), lokon, kaj daton. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Vi rajtas reaperigi materialojn el la bulteno kondiĉe ke vi ĝuste indiku la fonton kaj sendu al la redaktisto ekzempleron de la republikigita materialo. Opinioj esprimataj ĉi tie apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktisto.

Usona Esperantisto is the official newsletter of Esperanto-USA. Contributions are welcome in Esperanto or English; please use email when possible, and include your full name, a photo of your face, and your email/postal address. With photos be sure to include the name of photographer and subject(s), location, and date. Materials will be returned by postal mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content from this newsletter if you give credit and send the editor a copy of the reprinted material. Opinions expressed here are those of the authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.

★★★

Centra Oficejo • Central Office of Esperanto-USA

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA
☎ 510.653.0998; 2510.653.1468
✉ info@esperanto-usa.org
http://esperanto-usa.org

Direktoro • Director: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Phillip G. DORCAS

Vicprezidanto • Vice President: Tim WESTOVER

Sekretario • Secretary: Julie SPICKLER

Kasisto • Treasurer: (vaka • vacant)

Aliaj estraranoj • Other board members: Jenja AMIS, Mar CÁRDENAS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW, ROS Haruo, Tor KINLOK, Orlando E. RAOLA, Julie WINBERG, Christopher ZERVIC

Korekto kaj demando-peto

En la lasta numero mi preteratentis etan sed gravan eraron en la krucvortenigmo. La 42-a aludo vertikale tekstis: “Antaŭa nomo de ELNA”, por kiu la atendita solvo estis “EANA”. Sed EANA fakte estis tute aparta, iel konkuranta organizaĵo kiu ekzistis samtempe kun ELNA dum jaroj. ELNA mem fondiĝis pro bedaŭrinda skismo ideologia ene de EANA. La historio de la epizodo estas interesa; al scivolemuloj mi rekomendas libreton de nia libroservo: *A History of the Esperanto League for North America*, fare de William R. HARMON. (Kosto: nur \$5!)

Aliteme, ne forgesu ke mi atendas viajn demandojn por la nova rubriko *Demandu al Usona Esperantisto*. Ĉu vi havas demandon pri konfuza temo gramatika, historia aŭ kultura? Demandu al *UE*, kaj mi serĉos spertulon por verki respondon.

Bonan legadon! —Hoss FIROOZANIA

Vaŝingtono en 2010!

Oni nun planas detalojn por la venonta Landa Kongreso en Vaŝingtono. Ni solenos la 100-an datrevenon de la UK dum kiu Ludoviko ZAMENHOF vizitis Usonon, kaj ni bonvenigas viajn sugestojn. (*Vidu anoncon sur la malantaŭa kovrilo.*)

Ĉu via urbo en 2011?

Ni ankoraŭ serĉas volontulojn kaj kongresojn por 2011 kaj postaj jaroj. Ĉu vi kaj via loka grupo eble volus gastigi la kongreson en via urbo (aŭ en proksima granda urbo)? Se jes, vidu la Kongresan Manlibron ĉe <<http://tinyurl.com/kongreso>> kaj kontaktu al Jim HENRY, <jimhenry@pobox.com>. Notu ke via loka grupo ne devos fari ĉion; la Kongresa Komitato kaj aliaj volontuloj povos helpi.

We need you! Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly newsletter, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone & Fax: _____

E-mail: _____

Birthdate (M/D/Y): ____/____/____ Ham radio call: _____

In the member list, don't publish my: address phone fax email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

- Friend of Esperanto \$10.00
(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)
- Youth *(you must be under 27)* \$20.00
- Limited Income \$20.00
- Individual \$40.00
- Family \$60.00
- Sustaining \$80.00
- Life *(birthdate required)* \$800.00

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Vojaĝu ekstergalaksie




Ĉu vi rimarkas kiel la aŭtunaj noktoj pli kaj pli longiĝas de tago al tago? Ni jam legis pri la *ekliptiko*—la ĉiela zono tra kiu la suno ŝajnas iri dum nia ĉiujara orbito de ĝi. La akso de la Tero tamen kliniĝas relative al la ekliptiko, do la suna vojo estas iom oblikva:

printempe ĝi altiĝas kaj tagoj longiĝas, kaj aŭtune la fenomeno inversiĝas.

Astronomiistoj nomas la mezon de tiu sezona vagado *ekvinokso*—ĝi estas la dato kiam tago kaj nokto estas egale longaj. La aŭtuna ekvinokso jam okazis la 22-an de septembro, kaj nun alproksimiĝas nia vintra *solstico*—la dato kiam la suno atingas la plej malaltan punkton en la ekliptiko.

Tra multaj partoj de Usono, la plilongiĝantaj noktoj kaj klara, malvarmeta aero de aŭtuno prezentas bonajn okazojn por ĝui la noktan ĉielon. Hela kaj facile trovebla Jupitero ankoraŭ regas la sudan ĉielon ekde sunsubiro ĝis noktomezo, kiam Marso leviĝas en la oriento. Saturno sekvas frumatene, kaj finfine brila Venuso apenaŭ videblas en la matena krepusko. La luno pariĝas je malpli ol dek gradoj (proks. unu “manlarĝo”) kun Jupitero la **26-an de oktobro**, kun Marso la **9-an de novembro**, kun Saturno la **12-an de novembro**, kaj denove kun Jupitero la **23-an de novembro**.

Dum someraj vesperoj la suda ĉielo prezentis al ni la steloriĉan kernon de nia spirala galaksio, kaj ankaŭ la palan, nebulan strion formitan de ties “brakoj”. Dum aŭtunaj vesperoj la galaksia centro nun ŝajnas sinki sub la okcidentan horizonton, trenante malantaŭ si vidaĵon relative malhelan kaj malplenan—almenaŭ unuavide. Rigardante suden, ni nun vidas la spacon ekster la disko de la Lakta Vojo, kun ĝia relativa manko de proksimaj steloj helaj.



Do nun estas bona tempo turni la atenton al la malpli pompaj juveloj: la malhelaj nebulozoj, galaksioj, kaj stelamasoj ekster nia kosma “najbarejo”.

Unu el la plej famaj el tiuj vidindaĵoj situas en la konstelacio *Andromedo*, kies nomo venas de princino en la helena mitologio. Bedaŭrinde la konstelacio mem ne estas aparte elstara, sed feliĉe helpas nin giganta, fluganta ĉevalo!

Pegazo estas alia fama nomo el mitologio; ĝi apartenas al flugilhava besto bone konata eĉ hodiaŭ. La konstelacio de Pegazo ne vere havas la aspekton de ĉevalo—fluganta aŭ ne—sed meze de ĝi troveblas facile rekonebla formo: la “granda



Bildigo de Pegazo sur arĝenta monero, farita antaŭ proksimume 2 300 jaroj.

kvadrato". La kvar steloj de la kvadrato ne estas aparte helaj, sed inter ili etendiĝas relative senstela, malhela regiono (*vidu bildon malsupre*). En oktobro kaj novembro la kvadrato troveblas en la suda ĉielo, proksimume meze inter horizonto kaj zenito. Se oni etendas la brakon rekte antaŭ si, la grandeco de la kvadrato estas proksimume unu "manlarĝo" inter la flankoj.

De la supra, maldekstra angulo etendiĝas oblikve la steloj de Andromedo. La du plej helaj estas *Alferac* kaj *Mirak*, nomoj kiuj venas nerekte al ni de la antikvaj arabaj astronomiistoj. Kvankam helaj astroj ofte havas historiajn nomojn, sciencistoj nomas ilin ankaŭ per grekaj literoj ordigitaj laŭ ŝajna helo. Do la plej hela stelo en konstelacio (ĉi-kaze, *Alferac*) fariĝas Alfo (α), la dua plej hela fariĝas Beto (β) ktp.

Se oni sekvas linion inter β kaj μ (Muo), oni atingos palan, nebulan makuleton. (Multe helpas binoklo kaj klara ĉielo for de urbaj lampoj.) Longdaŭraj eksponoj de tiu makulo malkaŝas spiralan galaksion, iel similan al nia propra Lakta Vojo. En la jaro



Longdaŭra ekspono de la Andromeda Galaksio, kiu situas pli ol 2 000 000 lumjarojn for.

1923 la usona astronomiisto Edwin HUBBLE konstatas, ke la Andromeda Galaksio situas pli ol **du milionojn da lumjaroj** for; ĝi estas la plej malproksima objekto videbla al nuda homa okulo.

Se vi havas okazon, nepre provu ekvidi ĝin. Kaj dum vi rigardas, memoru ke la lumo, kiu nun atingas viajn okulojn, ekiris laŭ sia vojo kiam la unuaj membroj de nia biologia genro *Homo* aperis sur la Tero! ★



Approaches to classroom instruction

Generations of students in Western Europe and North America studied Latin by what came to be known as the grammar-translation method. Classroom lectures in the local language described the grammar, rote learning committed conjugations, declensions, and vocabulary lists to memory, translation into and out of Latin provided practice in practical use. Dull it might have been, but students did learn to read and write the language, and many language courses still employ the same techniques along with more modern ones.

Around 1900 a new approach to teaching modern foreign languages caught on in many countries, especially in Europe. The “direct method” got its name for teaching directly in the target language. Native speakers were considered ideal teachers, and reading and writing were secondary or even postponed to later courses. Advocates pointed to similarities with the way we learn a native language in infancy.

The parallels have been exaggerated, and research has shown that adults and older children don’t learn languages the same way infants do. In practice, direct method courses have only superficial resemblance to native language learning. But when done well, they can be an excellent way to develop conversational skills, and the courses can be less boring to the learner. They’re more work for the teacher, however, and it’s important to make sure that students don’t get lost or mentally exhausted trying to deduce the meaning of words and phrases from the teacher’s actions.

The best known proponent of the direct method in Esperanto was the talented Andreo Cseh. Students found themselves learning so much—and having such a good time doing so—that many even brought friends and family members to the



D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

dgary@mindspring.com

classes with them. It wasn’t unusual for Cseh’s courses to end up with a lot more students at the end than at the beginning. The major contributor to this success was Cseh himself; he was a remarkably gifted and entertaining teacher.

The “audio-lingual” method of language teaching, based on ideas from behavioral psychology, enjoyed a wave of popularity in the middle decades of the 20th century. Grammar in particular was treated as a set of behavioral habits, and students were given so-called “pattern drills,” in which they were expected to repeat the same phrase or sentence many times, substituting different words each time. The idea was to make the grammatical structure a reflex. The advancing science of language instruction had finally discovered something more boring than tables of verb conjugations. As behavioral psychology fell out of favor, however, so did the audio-lingual method as such. But some of the better things introduced at the same time, such as language labs, are still in use.

Since then a multitude of other approaches to language teaching have been introduced, as you’ll quickly discover if you search the web for “language teaching methods” or a similar phrase. They vary in their emphasis on the written language, how much of the students’ native language is used in class, and their employment of technology and individual instruction, etc. Some make use of interesting innovations, such as Pimsleur’s system of graduated recall and the “Learning by Teaching” ap-

proach in which students teach each other various language elements. All these methods have some features in common with older approaches, and no one method has been proven to be best. In practice, many teachers combine ideas from multiple methods to create their own unique technique, as in fact Andreo Cseh recommended to students of his method.

No matter what method or combination of methods to you decide you use, there are a few principles with very broad applicability:

First, it's best not to bore the student. This point is especially important when teaching people who won't be getting a grade, since as soon as they're bored, they can simply stop showing up. For this reason, rote memorization of word lists, dry, formulaic drills, and the like are best minimized or avoided entirely.

Second, recognize that many students tend to be shy about speaking for fear of making a mistake. En masse response in chorus, as used by Cseh, is valuable in overcoming that reticence. Another useful tool introduced by famed language tutor Michel Thomas is the idea of conversational "islands"; these are phrases a student can swim to when sinking. At the simplest level are handy stock phrases such as *Pardonu, mi ne komprenis vin* and *Kiel oni diras ___ en Esperanto?* Consider what students are apt to need the first time they attend an Esperanto meeting or a *kongreso*. They should be able introduce themselves, say *saluton, dankon* and *bonvolu*, explain that they're *komencantoj*, ask for directions to the *necesejo*, and understand the response!

Do emphasize speaking and listening in class, since that's the hardest part of any language to learn on one's own. But don't entirely avoid the use of writing, because many people learn faster with a visual element reinforcing the aural. Encourage

students to label common objects. If every time you enter the bathroom you see a mirror labeled *spiegulo*, you'll eventually remember the word.

Almost everyone seems to agree that students and teachers should strive to use the target language in class as much as practically possible. But there's no need to be rigid about this, especially when working with beginners. Even Cseh had a local Esperanto speaker present to translate what he was saying for the first class or two. If it takes a minute to explain something in your students' native language and 15 minutes to get it across using a strictly direct method approach, there's a lot to be said for the time-saving method.

At the same time, don't feel that you have to explain everything, especially not when you first introduce it. Give the students what amounts to an easy puzzle to solve—one they can figure out easily enough, but not completely obvious. It's more fun and more interesting that way, and students are more likely to remember what they've had to think about.

Review frequently, and make a point of emphasizing how much has already been learned. Students will work harder if they think they're getting somewhere.

Especially if the course doesn't meet every day, assign a modest amount of homework, possibly using lernu.net. A few minutes a day between class meetings goes a long way toward helping students retain what they've learned. ★

Korespondon deziras

Shai Mor, 87 Charlotte St. Apt. 5, Ottawa, Ontario K1N 8J9 CANADA sj1mor@gmail.com

Tridekjara, israeldevena fraŭlo kiu esperantistiĝis antaŭ nelonge. Profesie mi estas informadikisto. Ĉu vi interesiĝas pri Esperanto, judismo aŭ alispecaj intelektaj kaj kulturaj temoj? Ankaŭ mi, multe kaj entuziasme! Mi deziras afable komuniki kun homoj kiu(j) havas similan interesojn.

Bonhumoraj Zamenhofanoj en Bjalistoko

Bjalistoko renkontis nin per agrabla malvarmeto (kia bonaĵo post la varmeĝo de “Hotlanta”!) kaj Esperanto-flagoj en la stacidomo. Serĉante nian loĝejon sur la strato de Jerzego Waszyngtona—ankaŭ konata kiel “George WASHINGTON” (ĉu ne klare?!)—ni vidis kelkajn ŝildojn en Esperanto: “okulisto”, “monŝanĝejo”, “glaciaĵo”—kaj kiam mi vidis tuj apud nia loĝejo la hospitalon je la nomo de Ludoviko ZAMENHOF, mi vere volis pinĉi min por certigi, ke tio ne estas sonĝo!

Ni alvenis unu tagon antaŭ la oficiala komenciĝo de la kongreso kaj pasigis ĝin promenante tra la urbo. La nuna Bjalistoko havas iom malpli ol 300 mil loĝantojn, ĉefe katolikajn, kaj estis vere malfacile kredi, ke en la tempo de Zamenhof pli ol 70% da loĝantoj en la urbocentro estis judoj! La historio de judoj en Bjalistoko estas longa kaj tre malgaja: el pli ol sesdek mil-persona juda komunumo nur kelkcent homoj travivis la Duan Mondmiliton. La nuna nombro de judoj en la urbo estas tiom eta, ke oni eĉ ne listigas ilin inter la naciaj minoritatoj en Vikipedio.



Vilĵo HARRIS salutis la kongresanojn nome de Usono.
(foto danke al Lusi HARMON)



Jenja AMIS

Yevgeniya AMIS redaktis *Kontakt* kaj laboris kiel ĵurnalisto pri turismo en Ukrainujo. Ŝi loĝas en Usono ekde 2005 kaj laboras en la Ruĝa Kruco; ŝi estas rozkrucano kaj ŝi amas ĉiujn bestojn (aparte hundojn).

yevgeniya_amis@yahoo.com

Dum la ekskurso ni manĝetis en la kafejo “Esperanto” (oni eĉ povis havi E-menuon, laŭpete!), vidis belegan palacon de Branicki (kie funkcias daŭra ekspozicio pri Zamenhof!), plurajn katolikajn kaj ortodoksajn preĝejojn, la lokon de la fama bjalistoka geta ribelo, kaj la kulmino de la ekskurso, kompreneble, estis la monumento al Zamenhof. La fina punkto de la ekskurso estis la sidejo de la Esperantoklubo de Bjalistoko, kiu havas sian propran grandan ejon kaj estas vere belega—sed mi indigniĝis, kiam oni vendis (!) al esperantistoj teon, kio tute ŝokis min: kiel eblas vendi teon al la esperantistaj gastoj?!

Jam la duan fojon mi volis pinĉi min dum la solena malfermo: mi neniam antaŭe vidis tiom da esperantistoj en unu loko en mia tuta vivo, ĉio ĉi ŝajnis tute surreala! Estis paroladoj kaj mesaĝoj de Esperantaj, polaj kaj eksterlandaj gravuloj, bonvenigaj vortoj de la nepo de Zamenhof—t. e., D-ro L. C. ZALESKI-ZAMENHOF... Estis ege plaĉe vidi la salutojn de la kongreso nome de diversaj landoj (Vilĵo HARRIS salutis nome de Usono).


La akustiko, bedaŭrinde, ne estis idealaj—ja la salono Zamenhof fakte estis ne

salono, sed giganta tendo—tamen, ĝi havis klimatizadon, lignan plankon kaj televid-ekranojn: en la urbo simple ne estis sufiĉe granda kongresejo. Post la komuna fotado (kiun oni cetere faris de eskalo de fajrobri-gada kamiono!) komenciĝis la oficiala programo. Joel, kiel pli sperta kongresano (tio estis jam lia kvara UK), pli filozofie rilatis al la fakto, ke oni povas trafi ne pli ol dekonon de la tuta programo, sed por mi la peno elekti la “ĝustan” programeron estis tro dolora. Multaj kongresanoj eĉ iris de salono al salono por trafi almenaŭ pece-ton de kelkaj samtempe okazantaj pro-grameroj.

Certe ne estos spaco paroli pri ĉiuj pro-grameroj—mi mencias nur kelkajn. La filmoj de Roman DOBRZYŃSKI (aŭtoro de *La Zamenhof-Strato*) vere furoris—pluraj homoj eĉ sidis surplanke, ĉar ne plu estis sidlokoj. Interalie, estis filmo pri Bona Espero, pri la antaŭnelonga UK en Pekino, jubilea kongreso en Varsovio en 1987, pri la IJK en Zakopane kaj la sola Esperanto-urbo en la mondo—la urbo Herbergo en Germanujo. Tre interesa estis la prezentaĵo de Oomoto—kun te-ceremonio kaj tradicia japana danco. (Mi neniam vidis teon de tia verdegata koloro, kaj eĉ ne povis imagi, ke verda teo povas esti ĝis tiu grado verda!)



Koncerto de Supernova



Aŭskultantoj de la prelego de Amri WANDEL pri teleskopoj povis eĉ fari ekzamenon kaj ricevi oficialan atestilon! Tre interesa estis la Esperantologia Konferenco, kie oni instigis al debato pri la jud-eco kaj internacieco de Zamenhof. Dum la kunsido pri UEA kaj UN/Unesko, Neil BLONSTEIN rakontis pri siaj spertoj kiel nova volontulo en la UN-oficejo en Novjorko, kaj eĉ montris sian foton kun BAN Ki-moon, la ĝenerala sekretario de UN! La programeron “Centra Oficejo respondas” oni povus alinomi “Plendu al Osmo pri ĉio”: kelkaj plendoj estis validaj—ekzemple, malfrua apero de la kongreslibro, tiel ke oni ne povis pretigi ĝian brajlan version; aliaj estis vere sensencaj—ekzemple, kial la kongressekretario estas tiom juna.

Ege plaĉis al mi la ideo de “Kleriga Lundo”, kie la kongresanoj estis ne simple aŭskultantoj, sed aktivaj partoprenantoj de la programo: oni povis imagi sin oficiala tradukisto de Eŭropa Unio, provante traduki oficialan tekston de la preferata EU-lingvo al Esperanto (tiun sesieton



Ni estis granda kuriozaĵo por la lokanoj: kiom ofte oni vidas homojn sur verda unuciklo en la regiono?

gvidis profesiaj EU-tradukistoj: István ERTL kaj Brian MOON). Bedaŭrinde, la programeroj de kleriga lundo estis anoncigitaj nur en la kongresa kuriero, kaj se oni ial perdis aŭ ne ricevis ĝin, oni devis trovi alian kongresanon kun ĝi, ĉar ne estis oficiala afiŝo kun la horaro.

Iuj komentis, ke dum la tuta programo ne estis sufiĉe da interkulturaj kunsidoj aŭ seminarioj pri interkulturaj temoj. Tamen, la neoficialaj interkulturaj kunsidoj (t.e., babilado kaj nemalhavebla kongresa frenezado) okazis ĉie—plejparte en manĝejo kun bona (sed ne por vegetaranoj!) pola manĝaĵo kaj glasego da pola biero. Joel fakte trovis bonan senkulpigon por granda bierumado: la loka bierfirmao *Zubr* (“zubr” estas eŭropa bizon) donacas 10 groŝojn de ĉiu vendita biero al la fama bizona naturrezervejo Bjaloveĵa, kaj aliajn

dek groŝojn por plibonigi la novajn trotuaĵojn en Bjalistoko. Do, vivu la bizonoj—kaj la biero!

La kultura programo de la kongreso estis vere admirinda kaj impresa: samtempe kun la kongreso okazis internacia muzikfestivalo, kaj estas nekredeble, kiom da profesiaj muzikistoj kaj aktoroj kantis kaj aktoris en Esperanto speciale por la kongresanoj! Dum la internacia kulturfestivalo la muzikistoj de la bjalistoka filharmonio elstare ludis la Naŭan Simfonion de Betoveno—kaj “Odo al Ĝojo” estis kantata en Esperanto. Dum la sama koncerto, sep poemoj de William AULD estis kantitaj kun muziko komponita de la bjalistokano Max FEDOROV.

Oni povis ankaŭ vidi plurajn profesiajn teatraĵojn en Esperanto, el kiuj ni spektis du: monodraman spektaklon “Ludoviko Lazaro”, kies verkisto kaj aktoro estis Georgo HANDZLIK, kaj farson “Domo sur la landlimo”, kiun li tradukis. Fakte, ankaŭ rilate kulturen programon mi havis la saman dilemon: pluraj programeroj okazis ekster la kongresejo. (La programeroj okazis en 17 lokoj de la urbo!)

Kaj pola kaj juda kulturoj estis bonege reprezentitaj dum la kultura programo. Ege plaĉis al mi la koncerto de klezmera (jida) muziko, la kantoj de la juda ŝtetlo kaj la prelego pri la urba historio akompanata de la muziko de ĉiu epoko. Kelkaj homoj tamen plendis, ke la internacia vespero ne estis sufiĉe internacia: ja estis nur kelkaj profesiaj ensembloj kaj muzikistoj. Laŭ mi, ĝi tamen estis bona: la belorusa ensemblo dancigis almenaŭ duonon de la kongresanoj kaj Jomo dancigis preskaŭ ĉiujn restantojn. (Tamen ni ricevis plendon de unu kongresanino: “Ne dancu ĉi tie, mi ne povas bone vidi la scenejon.”) Jomo tiom

arde ludis, ke tute meze de la koncerto rompiĝis unu kordo. (Aŭ ĉu eble iuj volapukistoj sabotis la gitaron?) Sed por esperantistoj unu rompita kordo ne estas sufiĉa preteksto por lasi Jomon foriri: oni vokis lin ankoraŭ kaj ankoraŭ, malgraŭ tiu teknika problemo.

Merkrede la kongresejo ne funkciis—ja tio estas tradicie la ekskursita tago. Ni partoprenis la ekskurson por vidi eŭropajn bizonojn—urojn (jes, ankaŭ urinojn kaj uridojn!) en la jam menciita rezervejo Bjaloveĵa—tio fakte estas la sola restanta peco de eŭropa praarbaro, parto de kiu troviĝas en Pollando kaj parto en Belorusujo. Do, estas vere preferinde ne perdiĝi en tiu arbarego—aŭ vi ricevos “agrablan” akcepton de la belorusaj landlimaj gardistoj—niaj ekskursgvidantoj fakte rakontis, ke estis precedencoj!

La semajno pasis ege rapide. Estis bonege revidi multajn amikojn, konatiĝi kun novaj homoj kaj finfine vidi persone homojn, kun kiuj mi multe korespondis rete. Mi ankaŭ eksciis, ke la rolo de etaj lokaj kaj regionaj kongresoj estas same granda kaj grava kiel tiu de la grandaj internaciaj kongresoj: ja ĝuste dum la pli etaj aranĝoj oni vere havas pli da tempo por babili, konatiĝi kaj amikiĝi kun diversaj homoj, sen la daŭra timo maltrafi iun nepre vidindan programeron.

Ĉu mankoj? Eble, unue kaj ĉefe, verŝajne, relative malgranda nombro da partoprenantoj: malpli ol 2000 por tia jubilea kongreso.... Bedaŭrinde, ne estis sufiĉe da bonprezaj mezrangaj hoteloj. (La modesta hotelo, kie ni volis loĝi, estis jam plenezervita en marto.) Restis aŭ tro multekostaj, aŭ tro malproksimaj hoteloj (aŭ malmultekostaj sed malluksaj studentloĝejoj, kie ni loĝis finfine). Rilate al la loĝado estis

diversaj miskomprenoj: iuj helpantoj de la loĝiga servo bedaŭrinde tute ne parolis Esperanton, kaj mi aŭdis plurajn hororaĵojn: ekzemple, iu esperantisto, kiu pagis la hotelon, tamen devis dormi en sia aŭto, ĉar pro iu eraro lia nomo ne aperis en la listo.... Ege mankis ankaŭ tabulo kun taga programo kaj programŝanĝoj (ja ne ĉiuj programeroj estis en la kongreslibro). La plej negativa afero estis, kompreneble, la hontindaj vandalaj atakoj, kiuj ŝokis ĉiujn kongresanojn....

Sed malgraŭ certaj mankoj, la kongreso estis bonega, ĝuinda kaj bone preparita. Tiu ĉi kongreso estis ankaŭ bonega okazo reklami Esperanton en Pollando: pluraj memortabuloj, eldono de multnombraj artikoloj, broŝuroj kaj poŝtkartoj, speciala Zamenhof-trajno, disko kun informoj kaj kurso de Esperanto (eldonita de E@I) kiel aldonaĵo al la tutlanda pola gazeto (420 mil legantoj!), malfermo de la belega Esperanto-centro kaj kreo de Esperanta ekskurs-itinero en Bjalistoko—por menciigi nur kelkajn. Mi sincere klinas min antaŭ la multnombraj kongresaj organizantoj kaj lokaj instancoj—ili faris grandegan kaj tre sukcesan laboron. Grandan dankon! ★



Ursula GRATTAPAGLIA parolas pri Bona Espero

La kurioza rakonto de la ŝtuparo malaperanta

En tiu jaro la naskiĝtago de Usono okazis en merkredo. Unu semajnomeza feria tago ne sufiĉus por ekskurso, do mia bela edzino kaj mi decidis resti hejme por trakti nian liston de riparendaj objektoj.

Unua inter la eroj estis la ŝtuparo kiu kondukis al la subtegmento. Antaŭlonge la originalo rompiĝis kaj mi forĵetis ĝin, kaj ekde tiam ni atingis la subtegmenton per improvizita alumina ŝtupetaro. Ĝi estis malstabila kaj danĝera. Ni volis anstataŭigi ĝin per nova, daŭra ŝtuparo kiu povas faldiĝi kaj leviĝi per risortoj kiam oni ne bezonas ĝin. En nia parto de la lando oni nomas tian ŝtuparon “malaperanta”.

Malbonŝance, la aŭguroj por nia projekto ne estis favoraj. Unue, la temperaturo jam atingis preskaŭ tridek celsiajn gradojn je la sepa horo, kaj la varmega vento nomita “spiro de diablo” estis aparte forta. Due, kiam mia edzino Ana telefonis al la konstruata magazeno por demandi pri ŝtuparoj malaperantaj, la stultulino tie respondis: “Mi pensas, ke jes—nu, almenaŭ ni havas skatolojn kun etikedo ‘ŝtuparo malaperanta’. Eble tiuj enhavas ion.”

La tria aŭguro klare celis min. Kiam ni alvenis al la magazeno, la komizo kondukis nin al la loko por ŝtuparoj malaperantaj. Li estis impona virego, ŝajne tiel granda kiel fridujo, kaj lia nomŝildo montris nur la vorton “Grandville.” Kvankam mi ne estas aparte malalta, miaj okuloj estis samnivelaj kun lia nomŝildo. Li demandis, “Ĉu vi jam laboris kun tiuj ĉi, knabo?”

Mi diris, “Ne... sinjoro.”



Philip kaj Gayle DECAMP

La aŭtoroj, Phil (“Alko”) kaj Gayle (“Ana”) loĝas en Novjorzeo. Oni povas komenti al ili per la jena adreso:

TwoDeCamps@comcast.net

Li iĝis serioza kaj avertis min: “En la skatolo kun la ŝtuparo vi trovos ankaŭ okulvitrojn. Nepre uzu ilin. Vi dankos min poste.”

Mi rigardis la grandajn brunajn okulojn de Grandville. Ja, mi pensis. Li ne aspektis, kiel viro kiu ŝercus. Tute ne.

Ni decidis ke Ana—ŝi estas malgranda kaj pli lertmovata ol mi—laboros supre en la subtegmento. Mi starus sube sur granda latkesto por apogi la ŝtuparon dum Ana ĝin gvidus en la ĝustan pozicion. Komence mi enŝovis Anan tra la plafonan truon en la subtegmenton. Kiam la moviĝado de ŝiaj tolsuoj piedbatis polvon en miajn okulojn, senpripense mi surmetis la okulvitrojn de Grandville. Verŝajne li anticipis tiun ĉi problemon. Poste mi enŝovis la ŝtuparon tra la truon, kaj Ana ĝin lokis sur la subtenilojn. Nun la ŝtuparo apartigis nin: Ana supre kaj mi malsupre.

Mi aŭdis ŝian dampitan voĉon: “Alko! La instrukcio diris, ke oni metu la *tutan* ŝtuparon sur la subtenilojn. Ne nur la kovrilon, bubego! Do kie estas la ŝtuparo?”

Mi ignoris ŝin. Ĉiam mia karulino ri-proĉaĉas min, kaj ŝi neniam uzas unu vorton se tridek vortoj sufiĉas. Mi tiris malsupren al mi la ekstremajon de la ŝtuparo por ekscii, ĝuste kie ĝi atingus la plankon. Mi

bezonis fari strekon por mallongigi ĝin per segilo. Ana ankoraŭ babilis pri io. Sed kiam mi levis la kapon por rigardi ŝin, la okulvitroj glitis malsupren sur mia nazo kaj subite mi povis vidi nek mian edzinon nek la supron de la ŝtuparo. Tiam ĉio iĝis strangege. Kiam mi puŝis la okulvitrojn supren, subite mi povis vidi Ana-n kaj la supron de la ŝtuparo.

Mi provis denove: tra la okulvitroj mi vidis kaj mian edzinon kaj la tutan ŝtuparon; sen la okulvitroj mi vidis nek ŝin nek la supron de la ŝtuparo. Per okulvitroj, Ana-n; sen okulvitroj, nenion. Kvankam la temperaturo estis preskaŭ tridek ok gradoj, mia korpo frostiĝis.

Mia voĉo estis surprize serena kiam mi diris, “Mi pensas, kara, ke mi povas klarigi ĉi tiun. Kaptu la okulvitrojn kaj ilin surmetu. Vi ekkomprenos. Mi pensas, ke tio ĉi estas ŝtuparo vere malaperanta.”

Mi ĵetis la okulvitrojn supren en la mallumon, kaj atendis dum longa silento. Fine Ana ekbabilis denove: “Mi ne kredas ĉi tiun, Alko! Nenial, neniel, NE-**NI-AM!** Mi ne....”

Kiam ŝi paŭzis por spiri, mi kaĵole persvadis ŝin malsupreniri dum mi stabiligis la ŝtuparon sur la subteniloj. Sen okulvitroj, mi rigardis zorgeme dum la kruroj, la ŝorto, la bluzo, kaj fine la tuto de mia edzino reaperis antaŭ miaj okuloj. Kiam ŝi

sekure atingis la plankon, mi ĉirkaŭpremis ŝin. Ŝi nekutime silentis, kaj ŝia korpo estis rigida kaj tremis nerveze. Ŝiaj belaj okuloj brunaj estis tiel grandaj kiel subtasoj.

Milde mi diris, “Ĉu vi memoras la botelon de klara alkoholaĵo kiun nia filo donis al ni por Kristnasko?”

Ŝi kapjesis nerveze.

“Mi pensas, ke nun estas la tempo por malfermi ĝin, ĉu ne?”

Denove ŝi kapjesis nerveze.


Iomete pli poste, mi ekrigardis dum mia karega, delikata edzino—kiu mem ĵus reaperis—grandan kvanton da vodko malaperigis. Fine, en voĉo malrapida kaj zorga, ŝi diris: “Pensu: kio okazus se ni—ial—resendus la ŝtuparon al la magazeno? Se oni pririgardus la skatolon, kiel oni scius, ke ĝi ankoraŭ enhavas ĉiujn partojn?”

“Grandville”, mi diris simple. “Li scius.”

Ĵaŭdon matene mi reiris al mia laborejo sed haltis unue ĉe manĝetejo por aĉeti grandan tason da kafo por klarigi mian kapon. Sam, la blinda posedanto de la manĝetejo, demandis: “Malglata nokto, Alko, ĉu ne?”

“Malglata tago, Sam,” mi respondis. “Mi preskaŭ perdis mian virinon al ŝtuparo malaperanta.”

Samtempe Adolfo, la gvidhundo de Sam, levis sian kapon kaj min rigardis kun grandaj brunaj okuloj. Sam levis siajn brovojn. “Ĉu ŝtuparo



malaperanta', vi diris? Multaj homoj vidkapablaj havas problemojn pri tio. Foje 'Dolfo kaj mi ilin instalas semajnfine kontraŭ po cent dolaroj. Ne estas problemo por ni."

Mi rigardis la ŝafhundon. Liaj oreloj staris rekte kaj liaj grandaj okuloj brilis. Ŝajne ĉiam ĉirkaŭas min grandaj brunaj okuloj....

"Cent dolaroj?"

"Cent dolaroj kaj unu kondiĉo: 'Dolfo kaj mi laboros sole. Neniu rajtos eniri la ĉambron dum ni laboradas."

Mi ĝin konsideris. "Bone. Ĝin faru!"

El tiu afero sekvis alia avantaĝo: Ana kaj mi konservis la okulvitrojn. Ni lasis ilin sur la fridujo. Kiam ajn ni perdis ion, ni simple surmetis la okulvitrojn. Ŝlosiloj, plumoj, biletoj, ktp, subite reaperis kiam ni surmetis la okulvitrojn. Magie.

En la sekvaj monatoj ni ĉiam povis trovi ion ajn perditan; sed ni parolis al nek amikoj nek familio pri la afero.

Tragedio nin batis en oktobro. Nia virkato, Fifaro, ludis futbalon kun la okulvitroj kaj ilin rompis. Ana kaj mi tion diskutis. La okulvitroj jam fariĝis tre valoraj al ni. Ĉu sufiĉe valoraj, ke ni devus aĉeti alian ŝtuparon nur por ekhavi novajn okulvitrojn? Ni decidis ke jes, kaj tuj saltis en nian kamioneton por iri al la konstruada magazeno. Kiam ni alvenis, tamen, ni konstatis ke la ŝtuparoj provizataj venis de fremda fabriko—ne de Miĉigano, sed de Ĉinujo!

Ni petis la tiean stultulinon, ke ŝi konsultu al Grandville. Ŝi krakigis maĉgumon kaj respondis: "Li ne plu laboras tie ĉi. Tre, tre strange. Unu tagon, li simple malaperis."

Nek Ana nek mi surpriziĝis. ★

Enkonduko

Alskribas mi vin
hodiaŭ ĉar min
delonge forlasis inspiro.

Sed verkis mi ja
poemon el la
animo pri mia admiro.

Esperas mi ke
kritiko 'ho ve'
ne estos la sola eldiro,

Ĉar kantas mi por
amikoj tro for;
Doloras min ega korŝiro.

Sendorme

Dum ĉiuj denove en sonĝojn forvagas
kaj rompas silenton nur zumo insekta,
la fiksigardata ĉielo en nigron
disigas atenton ĝis kiam re-tagas
kaj menso revenas laŭ vojo nereakta.

Jen dubo pri ĉio pro pensaj profundoj.
Malhelo englutas la horojn malsate,
instigas esploron, postulas ekmigron,
dum tempo pasanta po lantaj sekundoj
spiriton velkigas solece, surstrate.

Flego

Tagon post tago komforton ŝi donas,
tuŝon post tuŝo pretigas por sorto.
Lagon post lago en sango li dronas,
tuson post tuso tiriĝas al morto.

Ripozo

Kaŝantaj sin ene de rondo
kuŝantaj sur peco de mondo
pro tiklo de nombro da herboj
kvietas en ombro la cerboj.

—*Simono KEITH*

Nord-okcidenta renkontiĝo

Raportis Ellen EDDY



De la 11-a ĝis la 13-a de septembro, la urbeto de Sidney sur la insulo Viktorio bonvenigis ĉirkaŭ 20 Esperanto-parolantojn el Brita Kolombio, Kalgario kaj la ŝtato Vaŝingtonio kaŭze de NOREK (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco). Sekvante temon por 2009 de la Unuiĝinta Naciaro “Internacia jaro de astronomio,” la partoprenantoj lernis multon pri niaj foraj ĉirkaŭaĵoj. Paul HOPKINS prelegis pri la originoj de astronomio kaj Ralph GONYEA donis detalojn pri la planedo Marso. Olga DUTEMPLE prezentis la vivon de frua dana astronomo Tycho BRAHE. Ŝi ankaŭ klarigis la diferencojn en mondaj numeralaj sistemoj kiam oni parolas pri la “astronomiaj sumoj” malgajnitaj en la borso lastafoje. Tio kion ni nomas *trillion* en Usono estas *billion* en la brita-germana sistemo kaj *duiliono* en Esperanto.

Aliaj prezentoj temis pri NASK, la lingva programo *Eurotalk*, Lingvolanĉilo (*Springboard to Languages*) kaj planoj rilate la 150-an datrevenon de la naskiĝo de L. L. ZAMENHOF. Wally DUTEMPLE menciis planojn festi tiun gravan daton kaj la reaktivadon de la UEA oficejo ĉe la UN-konstruaĵo en Novjorko. *Esperantic Studies Foundation* helpas financi la akcepton kiu espereble allogos intereson inter la multaj homoj kiuj laboras aŭ vizitas tie.

Taŭga ekskurso dum la kunveno estis

vizito al la apuda observatorio *Herzberg Institute of Astrophysics*, kiu ankaŭ festas la Jaron de Astronomio per malfermo de siaj konstruaĵoj al la publiko. Vizitantoj povis informiĝi pri la plej lastaj agadoj, inventaĵoj, kaj konstruaĵoj kiuj helpas la popolon pli bone koni sian lokon en la universo. Dimanĉon, post la oficiala fermo, tiuj, kiuj havis tempon vizitis la akvarion *Shaw Ocean Discovery Centre*, kiu montras tute alian mondon.


Laŭ la kutimo de NOREK, la venonta kunveno okazos ie en nord-okcidenta Usono.

PostSecret... en Esperanto?

PostSecret estas longdaŭra, komuna art-projekto por anglalingvanoj fare de Usonano Frank WARREN. Al li partoprenantoj anonime sendas sekretojn skribitajn sur poŝtkartojn; inter la sekretoj li elektas la plej interesajn por enskani kaj afiŝi en publika TTT-ejo. Jam sekvis similaj projektoj en la franca, hispana, germana, korea, kaj ĉina lingvoj.

Lastatempe, du eksNASKanoj el Usono fondis Poŝtsekreto-projekton en Esperanto. “Ĉar esperantistoj ofte estas tre interesaj homoj,” ili skribas, “ni kredas ke ili havas kelkajn interesajn kaj amuzajn sekretojn esprimindajn.”

Ne necesas sendi poŝtkarton; oni povas kontribui per retoŝto. Pli da informo troviĝas ĉe <<http://bit.ly/postsekreto>>.



Unu el la unuaj “poŝtsekretoj”

Kio estas “it”?

Ni ricevis plurajn tradukproponojn por nia lasta defio. Koran dankon al ĉiuj, kiuj partoprenis—SN, WFO, GB, EJJ, Edsal-lo, SM, kaj JC. Ŝajnis, ke prozo el la 17-a kaj 18-a jarcentoj estas pli populara temo, ol moderna poezio!

La proponita teksto estas la unua alineo (frazo) de *A Tale of Two Cities*, verkita de Charles DICKENS. Preskaŭ ĉiu lerneĵano konas la enkondukajn vortojn, kiuj fariĝis kvazaŭ proverbaj en la angla: *It was the best of times, it was the worst of times*.

Sed kio estas *it*? Verŝajne ĝi estas malmultsignifa vorto, kiu ĉeestas ĉefe por helpi al la angla gramatiko. Ĝi tamen malhelpas al la Esperanta gramatiko, kiu ne ŝatas tiajn sensignifajn *it*-ojn. Vidu frazojn kiel *Pluvas = It is raining*. Feliĉe neniu el niaj tradukintoj skribis *Ĝi estis la plej bona...* Ni trovis plej ofte *Estis la plej bona*. GB proponis: *Elstaris tiu tempo dum SM skribis Temis pri la plej bona periodo*. La elturniĝo *Estis la plej bona* estas sufiĉe bona, aparte rilate la temon kaj pravigebla per pluraj ekzemploj el la Tekstaro de Esperanto, kiu montras frazojn kiel *Estis la mateno post dancado (Fundamenta Krestomatio)* kaj *Estis la dua tago de la monatkomeno (Malnova Testamento)*. La plejmulto ankaŭ elektis redoni *the best of times* kaj *the worst of times* uzante *plej*, aparte taŭga, ĉar la alineo finiĝas per mencio de la *supera grado de komparo*.

Preskaŭ ĉiu tamen elektis apartan vojon por *it was the age of wisdom, it was the age of foolishness*. Ni legis diverse pri la *jararo de saĝeco, la erao de saĝeco*, kaj la (*jar*)aĝo de saĝo. Malgraŭ la rimo de la lasta, ĝi ne estas pravigebla per PIV (“aĝo



Lee MILLER



Tim WESTOVER

En ĉi tiu rubriko Lee kaj Tim prezentas tradukdefiojn por vi. Leginte viajn tradukojn, ili faros resumon de la plej bonaj provoj kaj sukcesoj, kune kun komentoj kaj reagoj pri kelkaj malpli sukcesaj rezultoj. Bonvolu sendi ne plurajn diversajn provojn, sed **nur unu** tradukon **antaŭ la 15-a de novembro** al:

bulteno@esperanto-usa.org

ĝenerale daŭras 5–6 milionojn da jaroj”). *Epoko, erao*, kaj *jararo* estas pravaj, sed *epoko* ŝajnas al ni plej bona.

La alineon karakterizas kelkaj ĉeftraĵoj: paraleleco en frazoj, kontrasto nur en unu/du vortoj, ripetado de la parto *It was*. Tiaj traĵoj ofte estas mallaŭdindaj—en kutima verkado, oni volas variigi la vortelekton, miksi la frazojn. La alineo de Dickens pli similas al retoriko, ol beletro. Tamen la alineo estas tre sukcesa kaj memorinda, verŝajne pro tiuj ĉi evitindaj traĵoj.

La plejmulto de niaj tradukintoj redonis la ripetadon de *It was* per uzado de *Estis*. Unu tamen ŝanĝis la ĉefverbon de *esti* al *temi* kaj *jeni*, aldonis foje *jes ja*—ĉio ŝajne por variigi la vortofluon. Kvankam tio estas ofte saĝa elekto, ĉi tie ŝajnas malĝusta kaj malfidela.

Pro la ripetado kaj paraleleco la alineo prezentas kvazaŭ perfektan okazon eluzi la *mal-* prefikson, sed preskaŭ ĉiuj el niaj

tradukintoj elektis ne fari tion. Kiel paroĵn ni trovis *kredado / kredomanko, Lumo / Tenebro, espero / senespero, saĝeco / stulteco*. Eĉ tiuj, kiuj uzis *mal-* ofte aldonis sufikson por iomete variigi la vortelekton: *saĝo / malsaĝeco, kredado / malkredado, kredado / malkredemo*. Estas interese—la sufiksoj ŝajne ludis nenian rolon, krom variigi la ritmon de la traduko. Kiel pravigi *saĝo* en unu frazo kaj (*mal*)*saĝeco* en paralela frazo? Sed pri *mal-*, Dickens mem variigis sian vortelekton; li verkis *belief / incredulity*, ne *belief / unbelief*. Ĉu pli ofta uzado de *mal-* enuigas la leganton, aŭ ĉu ĝi plifortigas la senton de kontrasto, kiu tiom gravas en tiu ĉi alineo? Malfacila demando, kaj ni lasos respondi la tradukinton.

Estis interese, kiel oni tradukis *some of its noisiest authorities*. *Noisiest*: *bruemaj, bruegaj, bruigaj, voĉemaj, bruaj...* sed neniu elektis *laŭtaj*. *Authorities*: *aŭtoritatoj, spertuloj, aŭtoritatuloj, eĉ erare aŭtorituloj*. Nur unu elektis la tre bonan vorton en Esperanto, *instancoj*.

Kaj kion pensi pri *in the superlative degree of comparison only*? La plejmulto tradukis *laŭvorte, en la superlativa grado de kompar(aci)o*. Sed ĉu redono de la vortoj nepre estas bona traduko de la senco? Kiel vi mem tradukus ĉi tiun frazeron?

Ni proponas ĉi tie sintezan tradukon, kiu sekvas la ekstreman modelon de *mal-*uzado. Ni proponas ĝin ne kiel la nuran solvon al la defio, sed kiel pensinstigon. Por la lasta frazo, ni aŭdacas verki alternativan solvon, kiu estas malpli fidela, ol la ofte proponata “superlativa grado de komparo,” sed kiu laŭ ni faras la frazon multe pli komprenebla:

“Estis la plej bona el tempoj, la plej malbona el tempoj; estis la periodo de saĝo, la

periodo de malsaĝo; estis la epoko de kredo, la epoko de malkredo; estis la sezono de Lumo, la sezono de Mallumo, la printempo de l’ espero, la vintro de l’ malespero. Ĉion ni havis antaŭ ni, nenion ni havis antaŭ ni, ni ĉiuj iris rekte Ĉielen, ni ĉiuj iris rekte malen—mallonge, tiu tempo similis la nunan tempon tiom, ke ankaŭ tiam kelkaj el la plej laŭtaj instancoj insistis ke oni agnosku ĝin, ĉu bone, ĉu malbone, kiel ‘plejan’ kompare al ĉiuj aliaj.”

Por la sekva defio, ni proponas tekston el *Of Mice and Men*, verkita de John STEINBECK (1902-1968). La citita teksto venas el frua interparolo inter George kaj lia kunulo Lenny.

“Guys like us, that work on ranches, are the loneliest guys in the world. They got no family. They don't belong no place. They come to a ranch an' work up a stake and then they go into town and blow their stake, and the first thing you know they're poundin' their tail on some other ranch. They ain't got nothing to look ahead to. ... With us, it ain't like that. We got a future. We got somebody to talk to that gives a damn about us...” ★

Senintenca Esperanto



Ĉu honesta reklamo? (Trovia en Julian, CA)

krucvortenigmo

Unu solvinto ricevos \$10-rabaton ĉe la libroservo de E-USA. Ĉiuj membroj rajtas partopreni, sed solvoj nepre alvenu al la redakcio (poŝte aŭ rete) antaŭ la 15-a de novembro. Bonan solvadon!

Horizontale

- | | | | |
|--|---|--|--|
| 1 Parto de la Interreto naskita en 1991 (mll.) | 32 "Dentoj mordas la langon, sed ambaŭ ___ amas." | 38 Ĝi estas norde de SD kaj sude de SF | 52 "Forveturis mal-saĝa, revenis nur pli ___" |
| 4 Lumomank' | 33 Ĉefrolul' de rakonto aŭ aventuro | 39 Vespermanĝa tempo (mll.) | 53 Manĝokart' |
| 8 Urba kvartalo, ofte mizera | 34 <i>La Infana</i> ___o (AULD) | 40 Bestkuracisto | 54 Duono de vidanta par' |
| 12 Horo kontraŭ IX? | 35 Henriko (kun "la") kiu edziĝis sesfoje | 45 "Pli bone estas sen___, ol tro." | 55 "Ho, mia ___,' ne batu maltrankvile" (ZAMENHOF) |
| 13 "Vortojn ŝparu, agojn ___." | 36 "Bone tiu ___, al kiu la sorto ridas." | 48 Muzika teatr' | |
| 14 Sekskuniĝ' | 37 Frakcio, aŭ iama edzino de LENNON | 49 "Pri kio ___as?" | |
| 15 Denove | | 50 Produktaĵ' de la renoj | |
| 16 Gent', klan' | | 51 Daŭre restadi ie, ekzemple en domo | |
| 17 "Konsoliĝas mizerulo, se li ne estas ___." | | | |

Vertikale

- "Kiu sin enjungis, devas ___."
- La Hobito*, aŭ ___ kaj *Reen*

- Oficist' komisiita kontroli la funkcion de io aŭ la agadon de ie
- Speco de lirika poemo kun palindroma nomo
- Konjunkcio
- Duono de glitanta par'
- "Oni prenas ___, oni redonas malrapide."
- Signalsistem'
- Aĵ' vendata aŭ aĉetata
- Inciti, eksciti, vundeti

1	2	3		4	5	6	7		8	9	10	11
12				13		★			14			
15				16					17			
18			19					20				
			21				22			23	24	25
26	★	28		★		29		★		30	★	
31					32				33			
34				★				★				
37				38			39					
			40			★				42	43	44
45	46	★			48					★		
50					51					52		
53					54					55		

Solvo de numero 2009/4

K	E	P		P	A	J	L		S	A	N	O	
I	L	I		E	N	U	A		E	M	I	R	
A	L	P		T	E	D	A		R	E	N	O	
M	A	R	S	O	M	A	R	Ŝ	O				
				A	L	I		Ĉ	E		S	A	G
G	O	R	Ĝ	O		R	O	L		P	L	I	
A	L	I	A		Ĉ	E	N		V	U	L	P	
B	E	T		P	A	V		D	I	R	A	S	
I	O	M		O	P		N	U	R				
				S	T	E	L	O	Ŝ	T	E	L	O
F	L	U	E		L	U	M	I		A	E	R	
E	L	N	A		O	P	A	L		N	O	D	
A	Z	I	L		J	O	D	O		A	N	O	

- 3 "Kies gasto mi estas, ___ feston mi festas."
- 4 "___ kaŭzo senenhava venas efiko plej grava."
- 5 Ekza monuono de Germanujo
- 6 Loĝant' de la lando de Paul GUBBINS kaj John WELLS
- 7 "Mi estis tre ekscitita... mi sentis, ke mi staras antaŭ ___o" (ZAMENHOF)
- 8 "Se oni amas la ___on, oni zorgas la paston."
- 9 Inklino
- 10 Teksaĵ' kiel kanvaso, farita el plantaj fibroj
- 11 Farita el la elemento kun simbolo "Au"
- 19 Alta plank' por eminentuloj
- 20 "Belecon taksas ne okulo, ___ koro."
- 23 Kunlandan' de Bertilo WENNER-GREN aŭ Sten JOHANSSON
- 24 "Ĉiu por si mem estas la plej ___."
- 25 Moviĝos de unu loko al alia
- 26 Sovaĝa porko
- 27 "Zorgu ___ vivon kaj lasu vivi alian."
- 28 Roma cifersigno
- 29 Demanda adjektivo, aŭ marko de korea aŭto
- 32 Ujo; tiuj faritaj el lado foje enhavas manĝaĵojn
- 33 Honora kantaj'
- 35 "Resanigu per ___; satigu per fiŝ' kaj pan'." (Dolchamar)
- 36 Kvina aŭtorad'?

- 39 "___ al la Eternulo, ne al lia sanktulo."
- 40 "Oni invitas, ___; oni donacas, prenu."
- 41 Historia daŭr' kun aparta karaktero
- 42 "Hako post hako estas la plej efika ___o."
- 43 Titolo de 35 horizontale
- 44 ĤAJAM kiu verkis robajojn
- 45 "Mi estas", por CICERONO
- 46 Grupe; ankaŭ nomo de oktobra kunveno en la Adirondackmontaro (mll.)
- 47 Blonda plant' el kiu oni faras oleon kaj tion en 10 vertikale

La lasta enigmo estis pli ol kutime malfacila. Malgraŭ la mensostreĉa defio, tamen, alvenis multaj solvoj—ĉiuj senmakulaj. Laŭrojn al niaj senlacaj ludantoj!

"Kia lukto!" skribis Dave RUTAN kun sia solvo. "La malpli facila ĝis nun!" taksis Arlyn KERR—kiu sendube estas vera krucvortamanto: "Estas bone ke mi faras la enigmon ĉiutage en la *New York Times*," ŝi skribis, "por akriigi mian lertecon."


Prave: krucvortenigmoj bone ekzercas la menson. Kaj por tiuj, kiuj ankoraŭ ne

obsediĝas pri ili, la redaktisto rekomendas la filmon *Wordplay* (2006). Temas ĝuste pri la *NYT*-enigmoj kaj ties feliĉe obseditaj solvadantoj, inkluzive de Ken BURNS, Jon STEWART, Bob DOLE, Bill CLINTON, kaj aliaj.

Gratulon al niaj aliaj solvintoj Vilĉjo HARMON, Ellen EDDY, E. James LIEBERMAN, Brian Neil BURG, Jacob SCHWARTZ, Russ WILLIAMS, William PATTERSON, George BAKER, Sally LAWTON, Keneĉjo GOLDBERGO, Olga DU TEMPLE, kaj la ĉi-foja gajninto... Peter MCCORQUODALE. Bis!

Novaj varoj ĉe la libroservo


All books listed can be ordered online at <http://esperanto-usa.org/retbutiko> or by mail from Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530. For some titles with multiple stories or songs, more complete information about contents can be found at our website. If a title is out of stock, you can request that the online bookstore notify you by email when the item becomes available again. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.



UTILA ESTAS ALIĜO Ulrich LINS

Extensive and well-documented study of the history of UEA during its first century. 2008. 126p. 235x160. Paper. Rotterdam (UEA). ISBN 9789290171058.

\$24.78



SANKTA KURAANO Esperantigita de

Muztar Abbasi. Projekto de la Universala Islama Esperanto-Asocio en Pakistano. Ĉio estas en Esperanto, krom la enkonduko al la araba lingvo. 2000. 210x140. Malmola bindaĵo. Pakistano.

\$50.00

Esperanto-USA 58a Landa Kongreso

“Lando de Libereco”²

Vaŝingtono, DK / Washington, DC

28a-31a de Majo, 2010 / May 28-31, 2010

Hyatt Regency Hotel

Bethesda, MD

Join us in Washington, DC to celebrate the 100th anniversary of LL. Zamenhof's visit to Washington in 1910. Suggestions are welcome for lectures and other program elements.

More information available soon at esperantodc.org

Contact: esperantodc@gmail.com

Kunvenu en Vaŝingtono, DK, por soleni la 100an datrevenon de la UK de 1910, kiam L.L. Zamenhof vizitis Vaŝingtonon. Ni bonvenigas sugestojn por prelegoj kaj aliaj programeroj.

Pli da informo baldaŭ haveblos ĉe esperantodc.org

Kontaktu: esperantodc@gmail.com

Esperanto-USA 58th Annual National Conference
“Land of Freedom”